# Esperanta Vorto 14 JANUARO 1953

CIRKULERO DE ESPERANTO ĈE „OSVĚTOVÁ BESEDA“ EN LANŠKROUN Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

## KARA LEGANTO

Ĉu necesas diri kialon de nia longa silento? Ni opinias, ke tio estus superflua. Ni simple na povas daŭrigi eldonadon. Ĉi-folieto estas pruvo de nia vivo. Nia agado, pri kiu ni ne povas skribi pro manko loko, pruvas niajn persiston kaj viglecon. Post tempo ni eble denove aŭdiĝos. Ideon de tutmonda paco kaj fratiĝo ni ne forlasos!

## BUDE ESPERANTO V O S N PŘIJATO?
## ĈU NIA CELO JAM ALPROKSIMIĜIS?

En decembro UNESCO traktis pri Esperanto en Parizo. Laŭ niaj nekompletaj informoj estis akceptita propono de Svisujo, kiu diras jenon: Ni postulu ĉiujn statojn, membrojn de Unuiĝintaj Nacioj, ke ili esploru aferon de Esperanto en propraj teritorioj kaj rezulton de la esplorado ili prezentu post unu jaro al ĝenerala kunsido de UNO en Montevideo.

Grava estas fakto, ke nia UEA gajnis gravan pozicion ĉe UNESCO kaj fariĝis konsilanto kaj informanto pri la afero de Esperanto en UNO. - Do, ek al laboro! Ni montru nian forton kaj kapablon! Red.

## EN POLLANDO ESPERANTISTOJ AGAS

Bone laboras esperantistoj en Vroclavo. Iliaj kursoj estas sukcesaj kaj kunvenaj programoj altnivelaj. „VROCLAVANO“ estas bulteno de: Filio „ODRASILEZIO“ de Asocio de Esperantistoj en Pollando, WROCLAW, Pollando.

## KION ENTREPRENI?

Jam trifoje sendajo de 135 ekzempleroj de „Heroldo de Esperanto“ por ĉeĥoslovakaj esperantistoj ne atingis la celon. Redaktoro, s-ano Teo Jung, sciigas: „ . . se ankaŭ n-roj 1 kaj 2 ne alvenus, mi devus, bedaŭrinde, ĉesigi la ekspedadon, ĉar tia nealveno de kvar sinsekvaj numeroj ja estus signo, ke Heroldo ne plu estas allasata al via republiko.“

## 5-JARA EKZISTO DE ESPERANTO_RONDO EN LANŠKROUN

La 19-an de februaro 1948 Landa Nacia Komitato en Praha aprobis fondiĝon de Esperanto-Grupo en Lanškroun, filio de EAČSR, La datrevenon ni rememorigos per solena kunveno de la grupo.

## NIA LABORO – NIA KRESKO

Fine de februaro preskaŭ 15 gekursanoj fariĝos absolvintoj de elementa kurso de Esperanto en Lanškroun. Post ekzameno okazos solena renkontigo kun disdonado de atestoj.

## EKSPOZICIO DE ESPERANTISTOJ EN LANŠKROUN

Esperanto-Rondetoj de Z.K.ROH TESLA kaj de Kleriga Kunularo en Lanškroun aranĝos komence de februaro ekspozicion „Klasbatalo en la mondo“, kiun afable pruntedonis s-ano Rudolf Burda el Plzeň. Tuta ekspozicio estas kunmetita el materialo akirita per Esperanto.

## NIA NOVA KLUBEJO !

El sodejo sur la ĉefa placo ni devis translokiĝi al novaj ĉambroj en Lanškroun I, strato de La 28-a de oktobro, n-ro 22. Ĉiuj vizitantoj estas bonvenataj! La klubejo estas malfermita regule ĉiumerkrede de 19-a ĝis 21-a horo. Adreso de la sekretario: F-ino N.Jirečková, Školní 128, Lanškroun.




# Kanto de Esperanta Junularo

Komponis: Jaroslav Šmejkal / ano de Esperanto-Junularo en Praha /
Esperanta teksto: Dro Tomáš Pumpr

Ni Esperanta Junularo, sub signo de la verda stel´
kaj en frateca solidaro, kun kanto marŝas al la cel´
Refreno: Venu al ni juna kamarad´, sub verda stela via lok´,
helpu en la paca batalad´, por granda sango de l´ epok´.
Kaj fidas nia juna koro, al forto de la juna brak´,
la stelo estas la Aŭtoro, jen, venas jam la suna tag´!

1. Ni, Esperant Junularo,
sub signo de la verda stel´,
kaj en frateca solidaro
Kun kanto marŝas al la cel´.

2. Ĝi estas pen´ por celo nobla
kaj se multiĝos nia rond´,
Eĉ forto iĝos centmil-obla,
el kiu kreskos la estont´.

Refreno:
Venu al ni, juna kamarad´,
sub verda stelo via lok´.
Helpu en la paca batalad´,
por granda sanĝo de l´ epok´.
Kaj fidas nia juna koro
al forto de la juna brak´.
La stelo estas la Aŭroro,
Jen, venas jam la suno tag´.